ANTAŬEN
suplemento de Informilo
1/21 MARTO 2013

❖❖❖

ĉiuj premiitoj en la konkurso de infan-desegnaĵo. La konkurso estas internacia, iniciatita de esperantistoj en Francio kaj Portugalio.“

Red.: Koncerne Esperanton, vi ofte mencias „ĝojon“...
Kamila: Kiam al mi en la jaro 1946 la patrineto diris: „Kamiljo, lernu Esperanton, tio estas bela lingvo kaj vi per ĝi interkompreniĝos en la tuta mondo,“ do mi komencis ĝin lerni por fari al ŝi ĝojon. Mi tiam ne antaŭsupozis, ke la ĜOJO povas havi tiom da formoj.

Mi dezirus al la infanoj, ke estu pli multe da tiaj patrinetoj, kia estis la mia – kaj kiuj dirus al ili la samon, kion diris mia patrino al mi! Unu el la plej fruaj „ĝojoj“ estas en mia rememoro la jaro 1947, kiam en Prago okazis la unua postmilita tutmonda kongreso de studentoj. Mi havis la honoron, de la tribuno sur la Venceslaa placo bonvenigi la studentojn esperantistojn. Je mia alvoko ĉirkaŭkunvenis pli ol 50 partoprenantoj el ĉiuj kontinentoj. Tiam unuafoje mi parolis kun nigrahaŭta studento el la suda parto de Afriko. Tio estas por mi neforgesebla renkontiĝo.

Antaŭnelonge studentino el nia E-rondeto ricevis leteron de esperantistokatolika, el la sama parto de Afriko. Ni ĉiuj kaj ĉiam ĝojas pro leteroj, kiuj alvenadas el diversaj kontinentoj. Esperantistoj estas amikoj...
Ankaŭ jena afero okazis baldaŭ post la milito: du fratinoj suferis pro tuberkuloza malsano, sed ne estis sufiĉe da bezonataj medikamentoj. Do, mi skribis al profesoro Henk Hendriksen en Nederlando, – kompreneble esperantisto – kaj li sendis la koncernan medikamenton rekte al fako de internaj malsanoj de la hospitalo, al la ĉefkuracisto Šádek. Li, spertante la efikon, proponis ekuzadi la lingvon Esperanto en la internacia Ruĝ-kruca organizo. Li opiniis tion eminenta eblo...

Red.: Kaj de kie vi ricevas la adresojn de esperantistoj?“
Kamila: Diversmaniere – Aŭ en nia bulteno STARTO, aŭ en la eksterlandaj adres-listoj. Kaj la anoj de nia rondeto ĝojas pro ĉiu letero. Jam laŭ la afranko kaj poŝtmarkoj oni povas diveni la landon kaj la kontinenton. Mi ekzemple dissendis leterojn al havenoj en diversaj landoj – pere de la Esperanto-centro de la koncerna lando – kaj tiel komenciĝis la internacia korespondado. Iam alvenis en unu tago eĉ kelkaj leteroj.

Red.: Ĉu alveturadis kaj alveturadas esperantistoj ankaŭ al ni?
Kamila: En la jaro 1949 vizitis la urbon Třebíč esperantistoj el Anglio, Belgio, Nederlando. Dum la solena vespero mi deklamis (parkere) en E-traduko poemojn de niaj klasikuloj – Jan Neruda, Otakar Březina, sed precipe kortuŝis la poemo „Maryčka Magdonova“ de Petr Bezruč. Multaj gastoj fariĝis niaj longjaraj amikoj. En la jaro 1955 mi ricevis leteron de Petr Bezruč, kiu dankis min pro la propago de liaj poemoj pere de Esperanta traduko – kaj en la volumo „Sileziaj kantoj“ (Slezské písně) enskribis per sia propra mano alian – ankoraŭ nepublikigitan poemon. Tiel Esperanto ebligas al la mondo proksimigi niajn kulturajn valorojn – kaj tio estas alia granda ĝojo!

Red.: Mi foliumas la volumeton „Sileziaj kantoj“ – kaj vere mi vidas la aŭtentan leteron de P.B. al vi...
Kamila: Bedaŭrinde, en la jaro 1952 la Asocio de esperantistoj estis disigita kaj multaj leteroj al ni ne alvenis – nek alvenis niaj al la eksterlandaj amikoj. La propagado de Esperanto pere de pres- kaj elsendo-komunikiloj estis tre limigita, do tial multaj niaj kunnacianoj ne scias, kio estas Esperanto. La t.n. „velura revolucio“ (1989) alportis novajn eblojn. Nun tio ne estas nur korespondado, sed esperantistoj povas nelimige sin reciproke vizitadi.

Same nia rondeto vojaĝis tuj – al la Esperanto-muzeo en Vieno. Ankaŭ mi povis akcepti inviton de mia amiko prof. Hendriksen, kiu vivas proksime de la urbo Naarden, kie estas entombigita nia Jan Amos Komenský (Komenio). Mi estis tre kortuŝita – ĉar mi pri tiu travivaĵo sopiris – kiel ĉiuj esperantistoj en nia lando.

Red.: La publiko havis eblon vidi en Okříšky tri grandajn ekspoziciojn de la korespondado, kiujn preparis vi kun viaj disĉiploj...
Kamila: Jes, tio estis por mi ĝojiga laboro – montri sur konkretaj aĵoj, pri kio la amikoj reciproke korespondadas – kvankam ne sciante la koncernan nacian lingvon. Tion faras niaj infanoj kun Francio – de siaj antaŭlernejaj jaroj senĉese. Ekzemple la lernantino Jana Ježková korespondis kun 12 es-

perantistoj. Neeldireble ŝin plezurigis leteroj el tiel foraj landoj kiel ekz. Japanio, Meksiko, ktp. La abundo dependas nur de la diligenteco de la koncerna korespondanto.

(El „Horácké noviny“, 25.9.2012 tradukis Margit Turková)

MEMORKAPABLO KAJ DORMOMANKO

Ĉu profunda dormo akcelas la cerban funkciadon en alta aĝo? Studaĵo montras statistikan interrilaton: Ju pli malbona estis la dormo, des malpli da griza cerba substanco estis observebla – sekve al tio perdiĝis memorkapablo.

Ŝanĝiĝoj en la cerbo pro la alta aĝo povas evidente ŝanĝi la dormon kaj tiel malakceli la memorkapablon. En cerbostudo esploristoj de la universitato de Berkeley en Kalifornio eltrovis kiel la perdo de griza substanco en la frunta lobo de la cerbo malfaciligas la enskribadon de memoraĵoj en la longtempan memoron. Tiu procedo tamen ne estas aŭtomata konsekvenco de la alta aĝo.



En alta aĝo kutime la memorkapablo iom perdiĝas. Same jam delonge estas konate, ke ĉe multaj altaĝuloj la profunda dormo ne bone funkcias. Krome pricerbaj studaĵoj montras, ke ĉe maljunuloj en certaj partoj de la frunta lobo ofte perdiĝas la griza substanco, kiu konsistas el la ĉelkorpetoj de la nervoĉeloj. La esploristoj eltrovis eblan rektan interrilaton inter tiuj tri fenomenoj.

Studaĵoj jam indikis, ke la profunda dormo plifortigas la transdonon de memoraĵoj en la longtempan memoron. Tiuj por tiu dormofazo tipaj deltacerbo-ondoj devenas de la meza antaŭfrunta kortekso – do tiu areo, en kiu en alta aĝo ofte perdiĝas griza cerba substanco.

La esploristoj sekve analizis la cerbon kaj la dormoprofilojn de 18 junaj kaj same multaj maljunaj plenkreskuloj. Kaj vere koincidis ĉe la altaĝuloj, kies meza aĝo estis 72 jaroj, reduktita kvanto da griza substanco en la meza antaŭfrunta kortekso kun reduktita aktivado de deltaondoj en profunda dormo.

En plua paŝo la partoprenantoj vespere devis lerni vortoparojn. Tiam la esploristoj testis la informojn 10 minutojn poste kaj post okhora dormofazo, en kiu la aktivado de la cerbo estis registrata. Homoj kun malbone funkcianta profunda dormo alportis post plendorma nokto signife malpli bonajn rezultojn en la memortestoj. La memorkapablo ja profitis de la nokta ripozo – sed malpli ol ĉe la junaj partoprenantoj.

La esploristoj akcentas, ke la aĝo ne ĉiam influas la memorkapablon. Anstataŭ tio la perdo de griza substanco en la frunta lobo malakcelas la profundan dormon. Tio siavice malfortigas la transdonon de informoj de la hipokampo al la longtempa memoro. Eble plibonigo de la funkciado de profunda dormo – ekzemple per ŝanĝo de konduto, medikamentoj aŭ aliaj terapioj povus bremsi la perdon de mensaj kapabloj en alta aĝo. Laŭ la esploristoj jam pli frua studaĵo montris, ke elektra stimulo de la cerbo povas akceli la profundan dormon kaj la memorkapablon.

Elektita el interreta retradio de Anton Oberndorfer

BLUDOV, LOKO DE REKORDOJ

Bludov estas vilaĝo, troviĝanta 6 kilometrojn oriente de eks-distrikta urbo Šumperk direkte al Olomouc. Ĝi havas 3 250 loĝantojn. Gvidantino de la Kultura domo estas Mgr. Jarmila Divišová, kiu havas grandan meriton pri rekordoj, ĉar ŝi devis ĉion organizi kaj aranĝi.

La unua rekordo el Bludov, skribita en la Ĉeĥan libron de rekordoj, estis en la jaro 2006. Ĝi estis planto „durman“ de s-ino Jana Brumovská, kiu

el stikoj kultivis ornaman planton „durman“ kun rekordaj 192 floroj.

La dua rekordo estis la Bludova „Ovoŝel-arbo“ (ĉeĥe Skořápkovník). Paskaj ovoj – kompreneble sen internaĵoj, kiuj estis elblovitaj kaj kolorigitaj, estis kolektitaj de septembro 2006 de infanoj kaj de ceteraj civitanoj kaj ili portis ilin al Kultura domo. Tie bonvolulinoj helpis ligi la ovojn sur ŝnuretojn.

La 7-an de aprilo 2007 la paskaj ovoj estis sumigitaj kaj pendigitaj sur unu kaŝtan-arbo en la ĝardeno de Kultura domo. La rekordo 30 658 pask-ovoj estis agnoskita kaj skribita en la Ĉeĥan libron de rekordoj. Kompreneble, ke ĉe tiu ĉi solenaĵo okazis riĉa kultura programo kaj multaj infanoj de la plej bonaj ov-kolektantoj estis premiitaj.

La tria agnoskita rekordo estis la plej longa funkcia duvoja aŭtodromo, konstruita el dividaĵoj ITES, la 30-an de majo 2009.

(El la letero de s-ano J.Krejčí)

Kaj pri la kvara rekordo jam skribas la gvidantino de la Kultura domo mem:

GIGANTA PASKA OVO

Kiam mi diris al mi, ke post la sukceso pri la „ovoŝel-arbo“ iam en la jaro 2010 estus bona ideo provi denove fari ian rekordon, venis al mi ideo krei egan (gigantan) ovon. Mi do petis kelkajn personojn pri kunlaboro, kaj troviĝis Zbyněk Poisl, kiu tuj jesis. Unue ni volis fari polistirenan skeleton, poste dratan, sed poste venkis plastaj tuboj. Zbyněk

sukcesis konstrui la skeleton, kaj oni tuj ekkolektis ovojn (kompreneble sen interna-ĵoj). La kolektadon oni komencis en la pasinta septembro kaj la areo de la Kultura domo iom post iom pleniĝis per ovoj.
Komence estis malgranda rapido, sed ju pli proksimiĝis Pasko, des pli la rapido kreskis. Ovoj amasiĝis ne nur el Bludov, sed ankaŭ el Olomouc, Mohelnice, Prago, Tanvald, eĉ el Anglujo! La tutan februaron kaj marton kunvenadis grupo da volontuloj en la kulturdomo kaj kolorigis, surfadenigis la ovojn.

Ĵaŭde la 5-an de aprilo 2012 ni starigis en la ĝardeno skeleton, kiu estis fiksita per tuboj kaj tegita per maska reto. Alto 4,2 m, diametro 3,3 m, plej granda ĉirkaŭmezuro 10 m. Sabate la 7-an de aprilo 2012 je la oka matene ĉe la ĉeesto de komisaro el la agentejo „Bonan tagon“ el Pelhřimov eksplodis la ornamado de la ovego kaj helpe de ŝoveskalo ni sukcesis la ovegon belaspektigi dum 2,5 horoj. La fina nombro de la pentritaj ovoj pendigitaj sur la giganta ovo estis 44 858.

Malgraŭ la nefavora veterprognozo ni havis bonan veteron, tial la deklaron de la rekordo kaj la distran programon povis ĉeesti centoj da rigardantoj. Por bona humoro kontribuis kontrea grupo Stetson el Velké Meziříčí, prezentiĝo de la fortega viro „Fera Zekon“ inkluzive la refreŝigon.
Krom la giganta ovo aperis ankaŭ aliaj kuriozaĵoj, ekz. kokino kaj virkoko eksterordinare grandaj, kaj tre longa paska vergo-frapilo de 7,02 m, kiun faris inĝ. Karel Janíček. Ĉi tiu frapilo estis enskribita la 7-an de septembro 2012 en la Ĉeĥan libron de rekordoj kaj kuriozaĵoj.

Ĝis la tempo de loka pilgrimo al la ovego celis torentoj da homoj. En la vizit-libro restis priskriboj de laŭdo kaj admiro, preskaŭ ĉiuj forportis fotojn de la giganta ovo kaj multaj revenis por rigardi ĝin ĉe nokta prilu-

mado. Ĉiu Bludovano alportis proksimume 15 ornamitajn ovojn, multaj eĉ oblojn. La tuta pezo de la ovoj estis proks. 400 kg, oni eluzis 2,5 km da ŝnuretoj. Se kalkuli 5 minutojn por prepari unu ovon (trablovi la internon, lavi, kolorigi kaj ŝnurigi) ni bezonis por la kompleta laboro ĉ. 3 740 horojn, t.e. 155 diurnojn (pli ol kvin monatojn).

En la gazetaro aperis fotografaĵoj de la ovego ne nur en regionaj gazetoj, sed helpe de ČTK (Ĉeĥa pres-agentejo) ankaŭ en la tutlandaj kaj eĉ eksterlandaj publikaĵoj. La artikolo kun la bildoj aperis ankaŭ en tiaj foraj landoj, kiel estas Anglujo, Kuvajto, Pakistano, Panamo ktp. La direktorino de la Kultura domo J. Divišová estas dankema al ĉiuj, kiuj helpis kiel ajn prepari tiun establejon. Al ĉiuj, kiuj la malplenajn ovojn alportis, ornamis, pendigis aŭ helpis finance.

Jarmila Divišová, la gvidantino de la Kultura domo, Bludov.

tradukis Míša Filip kaj jary.

==========

Per multaj ovoj vi agordiĝis al la proksimiĝantaj Paskofestoj, kiujn ni festos fine de marto. Jen nia bondeziro:

Travivu la Paskon, belajn printempajn festojn
en bonhumoro, kontento, ni esperu
en sunaj kaj pli varmaj tagoj
kaj ĉefe en bona sano.
Sincere deziras via redakcio.